

ESPERANTO

sub la suda kruco

septembro 2025





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 32[3] numero 159 septembro 2025

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruc estas sendata al membroj de la Aŭstralio Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZE).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZE: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruc

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de novembro 2025

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2025 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILO: *Heather Heldzingen tranĉas la rubando ĉe la Enderby Esperanto-Centro, Melburno*
Vidu paĝon 27.



ENHAVO

Antaŭparolo	04
La 59aj Baltiaj Esperanto-tagoj	05
La knabino kun la longa hararo (6)	06
Aŭstralia Censo	09
La plej kosta momento de mia vivo	10
Solvo de Nov-Zelanda Vortoserĉo	10
Mortis Max Wearing	11
Interesa demando pri A.I.	11
Aventuroj en Nepalo	12
Vizito al Sud-Ameriko	19
Neniu vojaĝo sen surprizo	21
Poeziangulo	22
Kongreso kaj Somerkursaro 2026	23
Instruistoj por la Somerkursaro	24
El la regionoj	26

Antaŭparolo

TERRY MANLEY

Ĵus alvenis novaĵo pri la morto de Max Wearing en Adelajdo. Max ludis gravan rolon en Esperantujo, kaj en Adelajdo kaj en Aŭstralio dum la 1990aj jaroj. Mi komencis lerni Esperanton en 1989. En 1991, dum parto de vojaĝo ĉirkaŭ Aŭstralio, mi loĝis ĉe domo de la filo de Max, Joseph Wearing. Li studis ĉe universitato en tiu jaro. Dum nia du-monata kunloĝado, ni strebis paroli Esperanton unu al la alia. Tiel nia parola lernado bone progresis. Antaŭ tiam mi pleje legis, skribis kaj aŭskultis Esperanton. En 1993, 1994, 1995 kaj 1996 mi iradis al la somerkursaroj en Adelajdo organizitaj de Max kaj la adelajdanoj. Kuraĝigita de la esperanta somerkursaro en San-Francisko, Max klopodis enkonduki dusemajnan kursaron en la esperantan kalendaron de Aŭstralio, dum la 1990aj jaroj. Tiu aranĝo daŭris

dum plia jardeko post tiam.

Max multe subtenis mian partoprenadon en la kursaroj. Mi loĝis ĉe Max, Beth kaj familio dum la kursaroj kaj kiel helpanto, Max apogis mian ĉeeston. Pro tio mia lernado de Esperanto burĝonis. Dankon Max. En 1997 la UK de UEA okazis en Adelajdo ĉefe pro la iniciato de Max.

Kaj AEA kaj NZEA ankoraŭ daŭre aranĝas somerkursarojn. Dum semajno en januaro 2026 okazos kursaron en Aŭklando, Nov-Zelando. Instruos Moisés Herrera el Kolombio kaj Joanne Cho el Aŭstralio. Legu iom pri ili en ĉi tiu eldono kaj aliĝu al neforgesebla Esperanta evento.

Do mi skribas de neĝokovrita urbo, Armidale, NSK. Rara evento ĉi tie. **E**



Terry en la neĝo de Armidale

La 59aj Baltiaj Esperanto-tagoj

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Dum mia restado en Eŭropo ĉi tiun jaron, la unua Esperanto-aranĝo, kiun mi ĉeestis, estas la 59aj Baltiaj Esperanto-tagoj en Kaŭnas (Litovio) de la 5a ĝis la 12a de julio. Tiu evento, organizita unue de studentoj sub la nomo Baltiaj Esperanto-tendaroj, naskiĝis en 1959, dum la sovetia epoko. De tiam ĝi kreskis al grava ĉiujara evento, kiu okazas en unu el la tri baltiaj landoj kaj kiu allogas ne nur baltiajn esperantistojn. Laŭ *Kunfluo*, la ĉiutaga bulteno, esperantistoj el 32 landoj venis al Kaŭnas, urbo kiu ludis grandan rolon en la vivo de Zamenhof. Entute ĉeestis 296 esperantistoj, kiuj devis elekti inter la 35 proponitaj prelegoj kaj la lecionoj je kvin diversaj niveloj.

La ĉefaj prelegantoj estis Ilona Koutny, kiu prelegis pri interkultura komunikado, Amri Wandel pri astrofiziko, kaj Mark Fettes pri lingvo kaj socio. Eblis ekscii iom pri la litovaj lingvo kaj kulturo dank' al Aida Ĉizikaitė kaj Severija Marija Banaityte.



Pluraj teatraĵoj estis prezentitaj: *Ŝaknovelo* de Stefan Zweig, en kiu Arnaud Lagrange, uzante diversajn ĉapelojn sukcesis ludi ĉiujn rolulojn de la teatraĵo, *Litovio de Barbora*, pri la vivo de Barbara Radziwill, dukino de Litovio, kiu iĝis reĝino de Pollando en la 16a jarcento, malgraŭ la kontraŭstaro de polaj nobeloj. Aktoris Birute Prekevičiute. Ankaŭ Mario Migliucci sole prezentis *Doktoro Esperanto*, kiun mi mistrafis, sed espereble okazos aliaj oportunoj.

Ĉiu vespero finiĝis per koncerto. Venis de Pollando la duopo Sumi, de Francio JoMo, de Svedio Jomart kaj Nataša, kaj de Italio Kjara kaj Lucio Avitabile.

Ekskursoj estis organizitaj ĉiun tagon por konatigi la ĉirkaŭaĵojn aŭ la litovajn famulojn kiel la pentriston/poeton Ĉiurlionis. Ĉiu ĉeestanto ricevis ankaŭ luksan libron kun pentraĵoj kaj poemoj liaj en du lingvoj (la litova kaj Esperanto). Sed mi ne volis mistrafi la prelegojn, do mi rezignis pri la ekskursoj.

Kaŭnas reprezentas por mi emocian lokon, ĉar tie mi ĉeestis mian unuan internacian Esperanto-kongreson en 1992 tuj post la sendependiĝo de la lando sekve de traŭma soveta periodo. Mi povis konstati kiel Litovio evoluis al lando simila al la aliaj eŭropaj landoj kiuj konstituas Eŭropan Union. En tiu tempo mi amikiĝis kun litovaj esperantistinoj, do ĉiam estas granda plezuro vivi kune dum unu semajno.

Venontjare la kongreso okazos en Riga (Latvio). Se vi ankoraŭ ne vizitis la baltiajn landojn, jen oportuno. 📍

En la urbeto Birŝtonas eblas eniri spacon

Elĉerpaĵo 6 el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: En 2023, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligon al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.


Cigaredoj savis mian vivon

Mi sonorigis la pordsonorilon. La pordisto alvenis kaj informis min, ke la germanaj soldatoj estas sur la unua etaĝo por kontroli ĉiun apartamenton. Mi diris al la pordisto, ke mi despere bezonas iri al mia apartamento sur la tria etaĝo dum unu aŭ du minutoj, kaj se la germanoj komencos alveni, li povos malsupreniri per la lifto, kaj mi uzos la servistan ŝtuparon. Mi ekiris al la tria etaĝo. Antaŭ ol mi foriris, mi lasis subvestojn lavitajn por sekiĝi en la banĉambro. Mi kolektis ĉion rapide inkluzive malgrandan valizon kaj tiam kuris malsupren. Tamen, bonŝance, mi alprenis la malĝustan valizon, tiun de mia edzo anstataŭ la mian. Mia edzo, konstanta fumanto, preferis bulgarajn cigaredojn. Kiam maristoj alvenis al Budapeŝto, li aĉetis ĉiujn cigaredojn, kiujn ili alportis. Li kaŝis la cigaredojn en sia malgranda valizo. En mia identa valizo mi havis ĉokoladojn, sardinojn, katunan lanaĵon ktp, por porti kun mi kiam la avertilo por aeratako sonoras. Mi alprenis la malĝustan valizon! Ĉi tiu misago savis mian vivon!

Mi kuris reen al la hospitalo. Ankoraŭ estis neniu sur la tria etaĝo. Mi tute elĉerpiĝis sed kiam mi malfermis la

valizon por havi iom da manĝaĵo, mi surpriziĝis ĉar estis nenio krom cigaredoj. Mi kaŝis la valizeton sub la litkovrilo, kaj atendis, atendis ĝis endormiĝo.

Laŭ la plej nova Postulo, ĉiuj judinoj, de iu ajn aĝo, devas raporti kaj enlistigi sin en la Deviga Laborejo. Subite mi aŭdis inajn voĉojn. Ĉiujn junajn. Oni portis ilin al la tria etaĝo sur eksmoda brankardo. Por eviti la Devigan Laborejon ili ŝajnis memmortigon. Ili telefonis al la ambulanco kaj raportis memmortigon kaj poste englutis pilolojn. La ambulanco portis ilin al la hospitalo, kie oni elpumpis la pilolojn el iliaj stomakoj, kaj ili rapide resaniĝis. Sed ili alvenis pretaj por resti. Ili ĉiuj havis manĝaĵon, litaĵojn, tualet



plu povis marŝi. La knabinoj portis min malsupren al la necesejo sur la dua etaĝo.

La sono de la bomboj ne ĉesis. Baldaŭ viktimoj de la bombado alvenis al nia loko en la gimnastikejo. Alvenis vunditaj viroj de la Deviga Laborejo, iuj preskaŭ mortaj. Oni neniam donis al ni manĝaĵon, akvon aŭ iun ajn helpon. Neniu alvenis por kontroli nin.

Dum la germana invado la budapeŝta geto ekestis. Ĝi estis apud la loko de la "juda hospitalo", kiu estis tuj ekster la geto. La sagkruculoj junaj ofte alvenis kun manĝaĵo por interŝanĝi kontraŭ cigaredoj. Cigaredoj iĝis la plej ofta interŝanĝaĵo. Mono estis senvalora. Mi negocis bone, foje akirante tomatosukon, cepon aŭ eĉ panon. Mi ĉiam kaŝis la cigaredojn sub mia litkovrilo, kaj neniu divenis kiom mi havis.

Kiam aviadiloj bombis la tegmenton de la hospitalo kaj ekestis truoj en la plafono, ni ĉiuj kovriĝis de falanta neĝo. Mi fabrikis kapkovrilon el mia kuseneto, kaj uzis mian zonon por teni ĝin ĉirkaŭ mia kapo. Estis 288 homoj tiam sur la tria etaĝo. Miajn amikinojn, la junajn knabinojn, la soldatoj iom post iom trovis, kaj la sagkruculoj junaj forportis ilin. Kian sorton atendis tiujn ni nur povis diveni. Homoj ĉirkaŭ mi parolis sence, nur por aŭdigi siajn voĉojn. Diabetulo juna estis mezkonversacia, kiam li subite ĉesis paroli kaj falis mortinta. Ni ĉiuj malsatis. Baldaŭ mortintoj ĉirkaŭis nin. La bomboj trafis ankaŭ

la ŝtuparon, kaj ni estis izolitaj sur la tria etaĝo. Estis nelonge ĝis nur tri el ni ankoraŭ vivis. Unu el la aliaj estis junulo sen kruro, kiu gardis tranĉilon sian. Li konservis ĝin kiel ilon por ebla despera memmortigo.

La judoj estis la celo por malamo. Batali estis nur duagrade grave. Ĉiun vesperon judoj estis venigataj al la bordo de la Danuba Rivero, devigataj senvesti sin kaj mortpafataj: iliaj korpoj ĵetataj en la riveron por forflosi laŭ la rivera fluo. Budapeŝton aviadiloj bombis kaj tage kaj nokte. La rusoj malrapide penetris el la oriento. La germanoj estis en Buda, sukcese detruantaj niajn ses belajn, historiajn pontojn, kiuj transiris la Danubon. Dum ilia forfuĝo ili rabadis ĉion eblan laŭ la elirvojo. La urbo estis sen elektropovo, brulgaso, lumoj, akvo,

Daŭras >

necesejoj kaj transporto. La stratoj estis neireblaj, kovrataj per rompitaĵoj brikoj kaj stakoj de betono el bombitaj konstruaĵoj. La detruaĵo estis stakigita kiel montetoj, danĝeraj por grimpi, pro dratoj, metalaj, vitro kaj simila rubaĵo, rompitaĵoj kaj neuzeblaj, ĉio kovrita per neĝo kaj glacio. Promeni en la stratoj ne estis eble. Ne eĉ ebleco transiri straton.

La bomboj daŭre falis tage kaj nokte. Unu falis colojn proksime al mia lito, sed bonŝance nek detonaciis nek eksplodis. Mi ne memoras kiom longe la bombado daŭris. Ni ne sciis ĉu estis tage aŭ nokte. La tri de ni, ne plu zorgis. Ni estis en mensostato kie ni kredis, ke ankaŭ ni baldaŭ mortos. Tamen, mi ĉiam sentis, ke la Ĉiopovulo zorgis pri mi. Ĉar mi estas optimisto, mi ne facile panikis. Preĝi ĉiun vesperon donis al mi memfidon.

La unua rusa soldato aperas

Subite ni aŭdis strangajn voĉojn, tiam rusa soldato aperis kaj disdonis al ni tri, ĉokoladojn. Poste iuj, zorge paŝantaj, iel portis min, sur provizora brankardo, malsupren laŭ mallarĝa restaĵo de ŝtuparo. Specialista kuracisto venis por kontroli min kaj miris pri kio okazis al mi. Li diris, se mi ne estis tiom malgranda ili foririgus ankaŭ min. Sed verŝajne ili kredis ke mi estas infano. Kontraŭe mi kredas, ke la forta, putra fetoro evitigis homojn for de mi.

Mi odoraĉis diable, pro seka sango kaj malpura korpo. Mi alkiutimiĝis al tio, sed aliaj ne povis toleri tion. La specialisto diris, ke li devas operacii min sed sen anestezo. Li ankaŭ diris, ke ne estas flegistino por helpi lin, ĉar ni ne estas en vera hospitalo. Li nur havis malgrandan poŝtranĉilon kaj mi devas kuraĝi. Li diris al mi, ke mia haŭto jam similas al pergameno kaj se li ne ekoperacius,

estus neniam espero por mia vivo, ĉar mi jam perdis tiom da sango, ke mi mortos post tagoj.

La specialisto promesis, ke li klopodos savi mian vivon kiel eble plej strebe. Li metis min sur ordinaran tablon, elprenis la tranĉilon kaj diris al mi krei, kriad, kanti aŭ paroli tiom laŭte kiom eble, senĉesi. Tiel li sciis, ke mi ankoraŭ vivas. Mi petis al li informi min kiam la operacio estas duonfarita. Sed li tute ne parolis. Subite li staris kaj ridetis, informanta min, ke mi estas tre fortvola persono kaj tre bonŝanca. Li diris, ke la operacio finiĝis, mi devas kuŝi kviete kaj trankvile dum kelkaj horoj kaj li promesis reveni por kontroli min morgaŭ.

Mi senkonsciiĝis dum longa tempo kaj apenaŭ povas memori ion ajn post la operacio. Mi nur tre klare memoras kiam la edzino de la pordisto alvenis, ridetis kaj ofertis al mi varman akvon por trinki. Ŝia edzo brake portis min malsupren al la bombŝirmejo, kaj metis min en longan seĝon tie

ofte ŝanĝiĝis. Fine ili konsilis min iri hejmen kaj faru nenion. Mi kredas, ke tio estis la plej bona konsilo.

Tiam la fingroj sur ambaŭ manoj miaj ŝvelis, rigidiĝis kaj etendiĝis. Mi ne povis fleksi ilin kaj ili tre jukis. Baldaŭ ankaŭ miaj piedoj konstante jukis. Plej ĝenis min, ke miaj fingroj ne povis teni ion ajn, eĉ ne plumon, kraĵonon, forkon aŭ kuleron. Estis unika kazo kaj mirado pro postvivo. Multaj kuracistoj alvenis por ekzameni min. Mi pli malsaniĝis. Finfine ili kuracis min per iaj X-radioj kaj oni avertis min, ke estontece mi devus ne ricevi X-radiojn por eviti bruligon de la ostoj. Mi informiĝis, ke mi suferis pro severa pernio.

Estis du semajnoj antaŭ ol mi iomete refortiĝis. Per polica, kaj urbinstanca intervenoj plus kuracista rekomendo, mi baldaŭ povis reveni al malgranda apartamento en nia konstruaĵo. Je tiu epoko nur kuracistoj havis prioritaton

por ricevi instalon de telefono. Tamen, per vera persvado, ĉar mi estis mirinda paciento, ankoraŭ resaniĝanta kaj sola, mi sukcesis pri instalado kaj konektado de telefono. Valoris multege tiutempe.

Mi ne havis novaĵon pri kie estas mia edzo aŭ liaj parencoj. Geedzoj kunloĝantaj tagon post tago estis miraklo. Baldaŭ mi sciis, ke de tiam mankos al mi tiun sperton, sed mi devis trovi kiel travivi tion.

Mi serĉis laboron kaj baldaŭ dungis min Sinjoro Kertész. Antaŭ la milito li eksportis la plej grandan kvanton de agrikultura produktaĵo al Anglio. Li dungis min kiel angla-hungaran korespondanton. La fakto estis, ke ankoraŭ estis nenio por korespondi. Neniu poŝtofacejo funkciis kaj nur kelkaj telefonoj konektiĝis. Mi dungiĝis sed ankoraŭ ne havis laboron. Mi sidis en la oficejo kaj faris nenion la tutan tagon. 

Aŭstralia Censo

TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Responde al lingva demando en la kvinjara censo en Aŭstralio, ĉu vi respondas ke vi parolas Esperanton en la hejmo? Kaj ĉu vi esperas, ke instancoj notos tion por informi aliajn pri nia ekzisto?

Mi faras tion, kvankam la parolo estas foje nur telefone aŭ per komputila komunikilo. Mi ja foje parolas Esperanton en la hejmo.

Antaŭnelonge mi vizitis amikinin, Jan, kiu estas urboplanisto kaj nuntempe foje intervuiĝas radie en Singleton pri regiona loĝantar-kreskiĝo kaj aliaj kulturaj kaj sociaj aferoj. Por fari tion ŝi havas aliron al statistikoj kaj analizo de tiaj aferoj. Mi interesiĝis pri tio, ĉu Esperanto aperas

en la statistikoj? Ne.

Jan informis min, ke en la 2021a an

Mortis Max Wearing

Ni funebras pri Max Wearing, kiu ĵus mortis en maljunula hejmo en Adelajdo. Max naskiĝis la 14an de aŭgusto, 1933.

Iama instruisto pri dramo, li havis tre bonan kantovoĉon. Relative malfrue en la vivo li aliĝis al la Esperanto-movado, sed tuj li aktivis en periodo, kiam nia lingvo apenaŭ spiris en Adelajdo. Meze de la 1980aj jaroj venis sufiĉe multe da novaj membroj dank' al la iniciato de Max okazigi kursojn ĉe TAFE. Li estis la motoro malantaŭ la kampanjo inviti la UEA-kongreson de 1997 al Adelajdo.

Probable por akiri spertojn pri nia movado, Max faris longan vojaĝon al

diversaj Esperanto-grupoj en Eŭropo en 1992. Krom tio, li iniciatis legogrupon, kiu renkontiĝis ĉiusemajne por voĉlegi kaj diskuti librojn en Esperanto, kaj tiu grupo ankoraŭ funkcias.

Ni bedaŭras, ke la multmerita Max ne deziris havi sian biografion notita en *Galerio de Esperantistoj en Aŭstralio* (de Charles Stevenson kaj Katja Steele).

Beth, la edzino de Max, kaj Joseph lernis Esperanton. Beth forpasis antaŭ pluraj jaroj, kaj nun li estas ĉe ŝi. Liaj tri filoj, Joseph, Richard, kaj David informas, ke la funebra ceremonio okazos la 15an de aŭgusto (la 14an Max estintus 92-jara). 



Aŭstraliaj Esperantistoj kun Kajto en Adelajdo – Max Wearing staras ĉe la dekstro

Interesa demando pri A.I.

TREVOR STEELE (ADELAJDO)

Ŝajnas, ke nun inter junuloj estas opinio, ke ne plu necesas lerni lingvojn ĉar, dank' al Artefarita Intelektro (A.I.), baldaŭ ekzistos aparatoj, kiuj tuj tradukos el iu ajn lingvo en alian. Des malpli necesos lerni internacian lingvon.

Kiel esperantistoj reagu al tiu opinio? Bonvolu skribi al ESK: esk@esperanto.org.au.



Aventuroj en Nepalo

SOPHIE HENDERSON (AŬKLANDO)

“Nu, karaj, iom da trekking!” anoncis Bharat, nia gvidisto.

“Kiom da trekking?” iu scivolas.

Ne tiom, en la fino.

Ni estas sur iu monteto en Pokhara, Nepalo, de kie ni povas vidi Machhapuchchhre kaj la montopintojn de la Annapurna montaro, en la Himalaĵoj. Mi estas ĉi tie en aro de dudek esperantistoj de ĉie ĉirkaŭ la mondo.

Ĉiun duan jaron, ekde 1995, Nepala Esperanto-Asocio okazigas la Internacian Himalajan Renkontiĝon, unu-semajnan programon de piedvojaĝado kaj grimpadon en la mond-fama Himalaja montaro. Ĝi estas perfekta por tiuj, kiuj amas la montogrimpadon.

Kaj en la alternaj jaroj, ekde 2014, la asocio okazigas la Specialan Ekskurson, dekdu-tagan turisman ekskurson ĉirkaŭ

Nepalo per buso. Ĝi estas perfekta por tiuj, kiuj ne volas aŭ ne povas montogrimpi. Estas tiu ekskurso, nun en sia sesa okazo, kiun mi nun ĉeestas.

Bharat Ghimire, nia gvidisto, estas tre aktiva nepala esperantisto. Li esperantistiĝis en 1990, kaj post nur unu jaro ekinstruas la lingvon, kaj en Nepalo kaj ĉirkaŭ la mondo.

Dek tagojn pli frue, Bharat persone renkontis min ekster la flughaveno en Kathmandu, varme salutante min kaj prezentante min per girlando de oranĝkoloraj floroj. Malgranda aŭto kun ŝoforo atendis nin. Mi kaj Bharat eniris la aŭteton, sekvate de paro da rumanaj esperantistoj, paro da rumanaj valizoj, kaj mia valizo. La nokto estis varma, la etoso estis amikeca, kaj la aŭto ja estis malgranda.



Post atingi hotelon, mi iris por vespera promonado tra Thamel, komerca kvartalo de Kathmandu, fama pro ĝiaj restoracioj, ĝiaj vendejoj de malaltkosta montogrimpada ekipaĵo, kaj ĝia nokta viveco. Kathmandu estas tute alia stilo de urbo ol tio, kion mi kutimis. Anstataŭ klare dislimitaj stratoj kaj klare delimitaj ejoj, ĉio verŝas en ĉion. Piedvojoj ne ekzistas. Motorcikloj estas ĉie. Iu vojo subite fariĝas templa korto – kun motorcikloj inter la stupaetoj – iam konstruejo, tiam vojo denove, inundita de piedirantoj. Super la stratoj, elektroduktoj abundas, interkruciĝante en ĉiu direkto, eĥante la ĥaoson sube. Ree en la hotelo, mi mesaĝis al mia amiko hejme: “Mi timas motorciklojn.”

La ekskursa programo komenciĝis per – kio alia? – vizito al templo. Nepalo estas merite fama pro siaj temploj: Multaj datiĝas de antaŭ pluraj jarcentoj, kaj ili montras belan kaj vastan gamon de arĥitekturo, lignarto, kaj aliaj belaĵoj.

Ili tamen ne estas lokoj de nur historia intereso: La multegaj temploj estis, dum la jarcentoj, bontenataj, plibonigataj, kaj pligrandigataj, kaj hodiaŭ ili daŭras kiel la hejmloko de la vigla, abunda, kaj ege publika religia vivo de la nepalanoj.

Puŝante nin inter vicojn de adeptoj, ni iris laŭ granda brika piedvojo, marŝante ĉirkaŭ almozuloj kaj sanktuloj. Bovino pretere vagis. Fumo leviĝis de apud la rivero. Atingante ponton, ni rigardis virinon, kiu banis sin en la sankta, bruna akvo de la Bagmati. Tuj supre, familianoj ĉirkaŭe amasiĝis dum korpo estis kremaciata.

Ĉi tio estas Pashupatinath, tuta kvartalo da temploj, sanktejoj, kaj apud riveraj kremaciejoj, dediĉataj al Pashupati, manifestiĝo de Ŝivao. Ni transiris la ponton dum rubo fluis sube, kaj supreniris la ŝtuparon preter serio de privataj tomboj, forpelante tagajn moskitojn. Supre de la deklivo, familioj de simioj ludis inter

Daŭras >





forĵetaĵoj, serĉante pecojn de manĝaĵo. Bril-koloraj ornamaĵoj rememorigaj pri la psikedela epoko pendis de unu el la brikaĵoj konstruaĵetoj, supozeble forlasaĵoj de la hieraŭa festivalo Shivaratri, la ĉiujara festivalo de Ŝivao. Ricevi la "Benojn de Ŝivao" estas, onidire, populara faraĵo inter la junularo de Nepalo.

Nia sekva celloko estis Boudhanath, mondfama pilgrim-celo por budaistoj. Kaj do, kiam ni eliris el la buso ĉe la flanko de iu polvoplena kaj trafikplena urba vojo kaj estis direktitaj al piedvojo inter butikoj, mi demandis al mi, kien ni iros antaŭ tio? Tamen, post ne plu ol minuto, mi tuj rekonis la orkoloran stupaon de Boudhanath, starante sur granda, blanka kupolo, aspektante ekzakte same kiel sur la kovrilo de Lonely Planet Nepal.

Kompreneble, tiu ĉi parto de la urbo ne same aĝas kiel la stupao; kiam Boudhanath estis konstruita, ĉirkaŭis ĝin rizejoj. Tamen la okuloj de Budao,

pentritaj sur la stupao, nun rigardas cirklojn da butikoj. Tiuj budaistoj kaj turistoj (kaj budaistaj turistoj), kiuj venas al Boudhanath, nun povas aĉeti brakringon aŭ brelokon, tibetan thangka pentraĵon de rimarkinde alta kvalito, incenson je diversaj prezoj, preĝajn flagojn, hamburgeron (tre bonan), aŭ espreso-kafon (ankaŭ tre bonan). Tiuj, kiuj vizitas Nepalon serĉante spiritecon, nun povas kunporti pecon de ĝi hejmen kun si.

La venontan tagon, kiam ni turistoj alvenis, la enirejo al la Kultura Urbo estis ŝtopita per iu kultura okazaĵo. Iu bruligis ion sur la grundo dum dancis du maskitaj uloj. Junaj nepalanoj spektis de cirklo ĉirkaŭ ili. Preterpasante ilin, ni eniris la unuan korton de Bhaktapur, hejmo de la Newar etno.

Ĉirkaŭ la korto, ni rigardis la apudajn malnovajn konstruaĵojn, faritajn el briko kaj ligno, kaj eniris, tra bele ĉizita ligna

pordo, iama reĝa palaco. Multaj el la konstruaĵoj ĉi tie konserviĝis dum jarcentoj, sed lignaĵistoj hodiaŭ ankoraŭ laboras laŭ ilia distinga loka stilo, kaj urbaj subvencioj estas haveblaj por konstruado de novaj konstruaĵoj laŭ la tradicia modo.

Post viciĝado por tre multe da grupoj, ni trovis nin en vico por io tute alia: loka jogurto. Konata kiel *juju dhau* ("la reĝo de jogurtoj"), ĝi estas riĉ-gusta kun kremo, kaj estas specialaĵo de la loka Newar popolo. Tradicie, kaj same hodiaŭ, ĝi estas prezentita en argilaj bovletoj, ankaŭ loke faritaj.

Dum ni marŝis al tagmanĝo, venis laŭ la strato ion tre bruanta, kaj ni devis halti ĉe la voj-flanko. Evidentiĝis, ke la bru-fonto estis komunista manifestacio tre vasta: Grupoj da infanoj en uniformoj, portantaj standardojn, multaj muzikistoj ludante flutojn, tamburojn, kaj cimbalojn (tre laŭtajn), aro de virinoj portantaj grandajn portretojn de famaj komunistoj, dancisto kun tradicia masko kaj lok-stila peruko. Ŝajnis, ke la tuta komunumo partoprenas.

Kvankam Nepalo estas fama pro siaj altaj kaj neĝaj montoj, montoj kaj montetoj ne kovras la tutan landon. Laŭ la longa suda bordo de Nepalo kuŝas la regiono Terai. Ĝi estas ĝangala kaj malalta, ne pli ol 300 metrojn super marnivelo. Ĉi tie situas Chitwan Nacia Parko, la unua nacia parko de Nepalo.

La vojaĝo al Chitwan daŭris unu tagon per nia privata buso. Kvankam la vojoj estis malglataj, nia ŝoforo estis lerta kaj atentema. Neniu kondukisto veturis tro rapide – tio estus tre danĝera. Ĉiu veturis ĝentile, ĉar tio estas absolute necesa. Kiel pasaĝero, mi sentis min ege pli sekure ĉi tie ol, ekzemple, sur ŝoseo en

Coromandel, Nov-Zelando, kie ĝentileco kaj rapideco-danĝero ne estas sufiĉe oftaj prizorgaĵoj.

Kiam ni alvenis en Sauraha, vilaĝo ĉe la rando de Chitwan Nacia Parko, la suno estis baldaŭ subironta. Kelkaj de ni promenis laŭ la ĉefstrato, preterpasante elefanton (malsovaĝan), kiu ankaŭ estis ekstere por vespera promenado. Ĉe la fino de la strato troviĝas rivero Rapti, kaj trans ĝi, la nacia parko mem. De teraso de iu kafejo, ni povis vidi en la rivero kelkajn formojn, aspektante kiel arbotrunkoj, tamen estante, fakte, gavialoj. Malsame kiel krokodiloj, la gavialoj prezentus nenian danĝeron al ni, ni estis certigataj, ĉar ili manĝas nur fiŝojn. Kelkaj Esperantistoj alproksimiĝis la riveron por pli bone spekti. Kaj jen! El la akvo venas tuj rekonebla formo, granda rinocero! Ni estas nur ĉe la rando de la nacia parko, kaj la revo vidi rarajn kaj sovaĝajn bestojn jam realiĝas.

Ni pasigis la tutan sekvan tagon en la nacia parko mem, komencante la matenon per kanota vojaĝo laŭ la rivero. Dum la kanoto dravis silente en la fluo, la solaj sonoj estis tiuj de la naturo, kaj foja ekkrio k

la ĝis tiam malkreskanta nombro de elefantoj en Nepalo.

Bharat eksplikis al ni, ke elefanto-rajdado iĝas eksmoda, kaj fakte ĝi neniam estis populara inter la elefantoj mem. Pro tio, li rekomendis, ke ni faru nian posttagmezan safarion per ĵipoj. Laŭ mi, agrabla elekto, kaj tio ebligus al ni trairi pli da tereno en la nacia parko. Kvankam ni estis en la ĝangala parto de Nepalo, la Parko konsistas ne nur el densa arbaro. Ankaŭ troveblas ĉi tie savanoj, sovaĝaj herbejoj, riveroj, kaj meandraj lagoj. La Parko estas hejmo al rinoceroj, ĉitaloj (speco de cervo), krokodiloj, mungotoj, pluraj specoj de alciono, pavoj, kaj cikonioj, kaj ni vidis ĉiujn ĉi de proksime de nia sentegmentaj ĵipoj. Nur la tigro volis kaŝi sin.

Proksime al la fino de nia safario, dum ni reiris al la vilaĝo, jen elefantego, certe pli granda ol tiuj, kiujn ni jam vidis en la elefantejo. Nia ŝoforo ne volis tro proksimiĝi, ĉar tiu ĉi elefanto estis vere sovaĝa.

“Ho, tiu estas Ronaldo,” nia gvidisto diris de la antaŭo de ĵipo.

“Kiel vi povas diveni *kiu* li estas?” iu demandis.

“Pro lia aspekto,” respondis la gvidisto.

La ŝoseo el Chitwan estas, en multaj lokoj, nun plilarĝigata, kaj ĝia surfaco plibonigata. Tiu ĉi ŝoseo trakuras la mezon de multaj vilaĝoj; vilaĝoj tiel malgrandaj, ke la ŝoseo estas iliaj sola strato.

Alveninte en novan urbon per la buso je iu frua vespero, ni vidis ĉe nia flanko la serenon apud-urban lagon kun boatetoj kaj, tuj poste, longan vicon de malpli serenaj sed certe allogaj butikoj. Pokhara

estas la dua plej granda urbo en Nepalo kaj ties oficiala “ĉefurbo de turismo”. (Ĝi ricevis ĉi tiun oficialan statuson de la landa registaro en 2024.) Kvankam jam krepuskiĝis kiam ni alvenis al la hotelo, ni ne zorgis pro maltrafo de butikumado. Ĉie en Nepalo, ĉio estas malfermita ĝis malfru-nokto. Mi povus aĉeti kaŝmiran ŝalon aŭ lui biciklon je la 9a vespere, se mi volus.

Sidante kun amikoj ĉe la balkono de komforta kafejo kun kameno, manĝante glaciaĵon kaj ludante kartludon (en Esperanto), mi vidis, trans la strato, grandan aron de ŝildoj por pli ol kvardek hoteloj. Pokhara ja estas turismeca – eĉ la kaverno havas donaco-butikon – tamen ĝi bone sukcesas pri tio, kaj por turisto (kiel mi), tio ne estas kaŭzo por plendi. La *Lakeside* (Apud-laga) distrikto estas speciale mojosa. Mankas ĉi tie la sento de malaŭtentikeco, kiun mi spertis en turismaj urboj ĉie de Nov-Zelando ĝis Ĉinio. En unu butiko, mi babilis kun sinjorino, kiu dezajnas sakojn faratajn el fibroj kiel kanabo kaj la pli rara himalaja urtiko, kiu kreskas ĉirkaŭ ŝia montara hejmvilaĝo. En alia, amiko kaj mi

en 1967, kiam akvobaraĵo estis konstruita por hidroelektro. La centralo havas gener-povumon de 1 MW kaj produktas elektron por la ĉirkaŭa valo. Antaŭ tiam, la tero estis uzata por kultivado de rizo. La farmistoj devis translokiĝi, sed la loĝantaro ne estis tiel granda tiutempe.

La bankisto ankaŭ diris al mi, ke la loĝantaro de Nepalo nun iĝas malpli juna. Junaj nepalanoj vojaĝas eksterlanden por ricevi edukadon, kaj poste ne revenas. Laŭ tiu bankisto, Nepalo ja havas oportunojn por investado, sed estas malfacile allogi investantojn al la lando, pro la manko de sufiĉe granda laboristaro.

Kontraste, por mi, kiel Esperantisto kaj turisto, Nepalo estas tre alloga lando, kiu samtempe plenumis miajn revojn kaj daŭre surprizis min. Ja ne menciendas ĉiaj tiaj mirindaĵoj kiujn ni spertis kaj travivis tie ĉi. Bharat, Indu, kaj la tuta teamo de esperantistoj de Nepalo forte kaj sukcese laboris por okazigi tiun ĉi ekskurson, kaj la kamaradeco inter la internaciaj gastoj ne troveblas ie ajn, krom en Esperantujo.

Venontaj Esperanto-eventoj en Nepalo estos anoncataj ĉe Eventa Servo: eventaservo.org/o/EO-Nepalo. Jam anonciĝis la 15a Internacia Himalaja Renkontiĝo, kiu okazos ekde la 26a de februaro ĝis la 8a de marto, 2026. 📅



> (Aŭstralia Censo) *Daŭraita de paĝo 9*

Sur la retejo de la ABS (Aŭstralia Buroo de Statistikoj) estas temo:

Aŭstralia Normo por Klasifiki Lingvojn. (ASCL)

Plej akurata informo:

Ĉi tiun klasifikon oni uzas por kolekti, konservi kaj dissemi statistikajn kaj administran datumojn pri lingvoj parolataj en Aŭstralio.

Lingvo estas unu el pluraj uzindaj

indikiloj de kultura diverseco en la socio de Aŭstralio. La ASCL provizas bazon por normigi kolekton, publikigadon kaj analizon de datumoj rilate lingvojn uzatajn aŭ parolatajn de la aŭstralia popolo. Oni uzas ĝin por klasifiki datumon el la ABS Censo de Popolo kaj Loĝlokoj kaj oni rekomendas uzi ĝin en administraj datumaroj, kie oni kolektas datumon pri lingvoj.

Daŭras >

Difino de Lingvo

Kvankam la ASCL ne klopodas proponi plenan difinon de lingvo, la sekva difino enhavas la esencajn erojn de lingvo kiel uzata de ASCL.

La Vortaro de Macquarie (sesa eldono, 2013) difinas lingvon jene:

"Komunikado en distingebla homa maniero, uzante sistemon de arbitraj simboloj kun konvencie asignitaj signifoj, aŭ per voĉo, skribado aŭ gestolingvo. Ĉia aro aŭ sistemo de tiaj simboloj kiel uzataj en pli malpli uniforman manieron de aro de homoj, kiuj tiel povas komuniki inteligente unu kun la alia."

Minimuma nombro da parolantoj bezonataj

La ASCL ne listigas ĉiujn (aŭ eĉ la plej multon) el la proksimume 6.000 lingvoj parolataj tra la mondo. Por registri apartan lingvogrupon, krom

bezoni universalan rekonon kiel aparta lingvo, minimuma nombro de parolantoj devas registri sin en la Censo de Popoloj kaj Loĝlokoj, aŭ en taŭga, alternativa datumaro. La minimumo bezonata por aŭstraliaj indiĝenaj lingvoj estas tri parolantoj. La minimumo nombro por aliaj lingvoj estas cent aŭ pli da parolantoj.

Do verŝajne Esperanto plenumas la necesajn kondiĉojn pri la difino de lingvo sed ne sukcesas pri la Minimuma Nombro kondiĉo. Aŭ ĉu? Ĉu ĝi estas universale rekonata kiel aparta lingvo tra la mondo? Do ne forgesu en 2026, jaro de censo en Aŭstralio, meti Esperanton kiel lingvon parolatan en la hejmo. Ĉu eblus nuntempe ke centon respondus tiel? Espereble.

Sube estas tabelo rilate al la 2021 censo. Ĉu ĝi havas ian rilaton al Esperanto? Mi ne certas.

Resumo	Datuma: Censo de Popolo kaj Loĝlokoj 2021
LANP (Lingvoj uzataj hejme)	Inventitaj Lingvoj
Nova Sud-Kimrio	33
Viktorio	27
Kvinslando	16
Sud-Aŭstralio	19
Okcident-Aŭstralio	8
Tasmanio	8
Norda Teritorio	0
Aŭstralia Ĉefurba Teritorio	3
Aliaj Teritorioj	0
Sume	116

Vizito al Sud-Ameriko

DAVID RYAN (WELLINGTON, N-Z)

En julio de 2025 mi vizitis Ĉilion kaj Peruon kun mia edzino kaj unu el miaj filinoj. La rekta flugo de Aŭklando al Santiago, ĉefurbo de Ĉilio, estis terure longa: proksimume 10 horoj por iri tien sed 12 horoj por revenflugo pro malfavora vento. Mi ne plendas pro la flugkompanio, LATAM, sed mi ne plu kapablas dormi en malgranda aviadila seĝo dum longa flugo.

Ni alvenis unue en Santiago, ege moderna urbo kiu ne estas tiel latinamerika-aspekta kaj povas esti iu ajn urbo ie en Nord-Ameriko aŭ Eŭropo kun altaj nubskrapaj konstruaĵoj kaj larĝaj bulvaroj. Ni vizitis la historian urbcentron kaj promenis ĉie. Tre bela estis la neĝkovrita montoĉeno (Andoj) tre proksima al la urbo kaj videbla ekde ĉie.

Ni vizitis ankaŭ Valparaíso, havenurbon apud Santiago. Ni promenis en fama

kvartalo kie multaj konstruaĵoj estas bele farbitaj en diversaj koloroj.

Ni trovis ĉiam multajn turistojn el Brazilo. Ni ofte aŭdis la portugalan lingvon kaj turismaj informoj videblis en la hispana, angla, kaj portugala lingvoj. En nia hotelo kelneroj kaj aliaj stabanoj povis konversacii portugale.

Post Santiago ni flugis al Cusco en Peruo. Cusco estas unu el la plej gravaj turismaj urboj en Peruo kaj la urbcentro estis plena je turistoj el diversaj landoj (sed dum nia tuta vojaĝo ni rimarkis, ke mankas precipe ĉinaj kaj usonaj turistoj, kiuj ofte multnombras en Nov-Zelando). Cusco havas multajn koloniajn konstruaĵojn kaj mi ĝojis viziti imponajn preĝejojn kaj eksan monaĥejon. Fakte la monaĥejo ankoraŭ funkcias. Tie

Daŭras >



Machu Picchu

loĝis antaŭe ĝis 100 monaĥoj kaj nun estas kvar. En Cusco ni trovis multajn indiĝenojn, kiuj parolas la keĉuan kiel gepatran lingvon.

Multaj homoj vizitas Cusco por fari viziton al Machu Picchu, inkaan vilaĝon konstruitan dum la 15-a jarcento sur altaj rokoj. Oni ne scias precize kial la enloĝantoj subite forlasis la lokon, sed oni kredas ke tio okazis eble por protekti la sanktan lokon kontraŭ alproksimiĝantaj hispanaj konkerantoj. La ruinoj de Machu Picchu restis kaŝitaj dum multaj jarcentoj ĝis usonano, Hiram Bingham, malkovris la lokon en 1911. Por atingi Machu Picchu, oni devas iri unue en trajno al vilaĝo Aguas Calientes kaj poste en aŭtobuso dum duona horo. Por protekti la ruinojn kontraŭ amasturismo, la registaro starigas limon por ĉiutaga vendo de enirbiletoj.

Alia vidindaĵo apud Cusco estas Vinicunca (Rainbow Mountain en la



Monto de Sep Koloroj

angla, konata ankaŭ kiel la Monto de Sep Koloroj). La alteco de la monto estas 5 200 metroj. Unue oni devas promeni dum proksimume unu horo, sed ankaŭ eblas uzi motorciklon aŭ rajdi ĉevalon (kiel ni faris). Tamen, oni devas piediri dum la lastaj 10-15 minutoj. Mia juna filino spertis neniun problemon sed mia edzino kaj mi preskaŭ mortis pro la manko de oksigeno. Finfine ni atingis la montsupron kaj la vido al la monto estis ege bela pro ĝiaj tavoloj da diverskoloraj mineraloj, kiuj ne videblis ĝis antaŭ proksimume 15 jaroj kiam, pro klimatoŝanĝigo, ne plu falis neĝo kaj la beleco de la monto malkovriĝis.

Post Cusco ni flugis al Limo, ĉefurbo de Peruo. Limo estas granda urbo kun gravaj trafikaj problemoj. Tamen, en la urbcentro estas multaj hispankoloniaj konstruaĵoj. Limo (kaj ĝenerale Peruo) estas konata pro sia kuirarto kaj mondkonataj restoracioj.

Post Limo ni reflugis al Santiago kaj enaviadiliĝis por nia revenflugo al Nov-Zelando. Nia vizito al Sud-Ameriko estis vera surprizo: Santiago pro ĝia moderneco kaj Peruo pro ĝia inkaa kaj hispana historio. Dum du semajnoj ni estis en lokoj kie ni ne ofte aŭdis la anglan lingvon, kio emfazis por ni la fakton, ke nia mondo estas vere diversa kaj ni devas pensi pri tio




Bele farbita konstruaĵo en Valparaíso, Ĉilio

kio ekzistas ekster la anglalingva mondo. Mi nun ĝojas pro la fakto ke nova mondo estas nun facile alirebla por ni post nur 12-hora (sed laciga!) rekta flugo. **E**



Katedralo de Limo, Peruo



Hispankolonia arkitekturo en Cusco, Peruo

Neniu vojaĝo sen surprizo

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Kiel kutime mi forlasis Melburnon fine de junio por flugi al Eŭropo cele, krom renkonti miajn familianojn kaj geamikojn, ĉeesti kelkajn Esperanto-aranĝojn. La unua parto, Melburno/Singapuro, okazis kiel planite: la aviadilo estis akurata, la konflikto inter Irano kaj Israelo ne efikis sur la flugo. Sed kiam mi eniris la atendejon por la dua parto de la flugo, t.e. Singapuro/Parizo, mi rimarkis ke la stevardaro sidis tie anstataŭ eniri la aviadilon. Venis anonco, ke la aviadilo ne pretas. Post ĉirkaŭ tri horoj da atendado mesaĝo per la laŭtparolilo petis nin iri al alia pordo por eniri alian aviadilon. Kompreneble la sekureca kontrolo devis esti refarita kaj estis disdonitaj manĝaĵetoj kaj akvo.

La aviadilo forlasis Singapuron kun

kvin horoj da malfruo. Mi planis dormi en la aviadilo malgraŭ la manko de komforto sed konsekvence mi devis resti veka dum la tuta nokto. Finfine iu oficisto sciigis la pasaĝerojn, ke ŝanĝo de aviadilo nepris ĉar iu faligis sian telefonon dum la antaŭa flugo kaj ne eblas uzi la aparaton ĝis la telefono estas retrovita. Pro tio ke la baterio enhavas lition, oni timas incendion.

Do pro la mallerteco de iu pasaĝero, centoj da homoj devis solvi konsekvencajn problemojn: ĉu trovi alian konekton al alia aviadilo aŭ trajno aŭ buso, ĉu kontakti la atendontojn por interkonsenti pri nova rendevuo. Kiel imagi ke mallerta ago povus ĝeni tiom da homojn sen menciiri la koston por la kompanio! **E**

Poeziangulo

kun **KIT KELEN (MARKWELL, NSK)**

LYNDON WALKER (RIVERO SUDA ESK, TASMANIO)

Ie en ĉi tiu mondo eksplodas bomboj
Kaj morto kaj fajro kaj malĝojo

Somewhere in this world there are bombs going off
And death and fire and sadness

Sed por mi en ĉi tiu momento
La vivo venigis min ĉi tien

But for me in this moment
Life has brought me here

Al la verdaj foliaj bordoj de ĉi tiu malvarmeta rivero
Bobelanta super rokoj dum ĝi faras sian vojon

To the green leafy banks of this cool river
Bubbling over rocks as it makes its way

Al ne tre malproksima oceano
Malvarma kaj vigliga

To a not very distant ocean
Cold and exhilarating

Kun bona virino
Atendanta hejme

With a good woman
Waiting at home

Kun bona koro
Kaj neniu aparta tagordo

With a good heart
And no particular agenda

Tiel speciala: ke ĝi sentigas min
Kulpa kaj dankema.

So special : it leaves me
Guilty and grateful.

Lyndon Walker naskiĝis en Townsville, Kvinslando. Li travojaĝis la mondon legante poezion kaj nun loĝas en Beauty Point, Tasmanio. 📍



Lyndon Walker legas sian poemon Compassionate ĉe The Wheeler Centre, Melburno, 2011

Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Kongreso kaj Somerkursaro 2026

AŬKLANDO, Nov-Zelando • 11 – 17 januaro 2026

SAINT FRANCIS RETREAT CENTRE

50 Hillsborough Road, Mount Roskill, Aŭklando, Nov-Zelando



PROGRAMO inkluzivos:

- Klasojn de Esperanto
- Vesperon de teatro kaj muziko
- Ekskursojn
- Prelegojn pri Esperanto kaj aliaj temoj
- Konversacion kaj ridon
- Jarkunvenojn
- Amikiĝon, planadon

PREZOJ	Ĝenerala	Plentempa studento
PLENA KONGRESO:		
Aliĝo + 3 manĝoj tage + 6 noktoj da loĝado	\$1 200	\$1 100
Aliĝo + 2 manĝoj tage (tagmanĝo kaj vespermanĝo) – SEN loĝado	\$700	\$600
ĈIUTAGA PREZO:		
Aliĝo + 3 manĝoj + loĝado	\$200	\$180
Aliĝo + 2 manĝoj (tagmanĝo kaj vespermanĝo) – SEN loĝado	\$140	\$120

Instruistoj



Moisés Herrera
(vidu paĝon 24)



Joanne Cho
(vidu paĝon 25)



Por pli da informo, kaj por registriĝi, vizitu esperanto.org.au/kongreso

Instruistoj por la Somerkursaro

Moisés Herrera

Moisés estas kolombia programisto, pasiulo pri lingvoj kaj matematikoj, sukcesinto je la nivelo C2 de Esperanto laŭ la KER-ekzamenoj, nuntempe kunlaboranto ĉe la Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) kaj profesia programisto ĉe la Aŭstralia Esperantista firmao, Orelo Software.

Lia vojaĝo en Esperanto komenciĝis ĉirkaŭ la jaro 2018 per Duolingo kaj tuj poste per Lernu.net kie li plene enradikiĝis por serioze lerni la lingvon kaj movadumi. En la jaro 2019, li komencis kunlabori kun la ne-profitcela organizo KEL, kie li helpis pri reorganizado de la nova loka oficejo kaj la enretiga katalogado de ĝiaj biblioteko kaj libroservo. Ĉirkaŭ la fino de la jaro, li aliĝis kiel instruisto por la ĉeestaj kursetoj realigataj en la urbo Bogoto, por lernado de Esperanto, kie lernantoj kunvenis por lerni la bazojn de la lingvo en agrabla kaj amikeca etoso. De tiam, post limigoj kaŭzitaj pro la KOVIM-pandemio, la organizo migris tute al interreta agado.

En la unua duono de 2020 okazis baza kursaro por la lernado de latinidaj lingvoj per Esperanto, kreante la bazojn por estontaj retaj kursoj. Tuj poste, pro invito de UEA por realigado de reta kurso por lernado de Esperanto, la teamo de KEL, akompane de UEA kaj TEJO, entreprenis la iniciaton kaj realigis la unuan okazon de kio iĝis la ĉiujara serio de la Internacia Kurso de Esperanto por Hispanparolantoj,

al kiu aliĝis pli ol 600 interesitoj kaj ĉirkaŭ deko da bonkoraj volontulaj instruistoj tuj en ĝia eko.

En la sekvantaj jaroj, pro la bonaj reagoj de la organizoj kaj de la publiko, KEL daŭrigis la realigadon de la kursoj, al kiuj iom post iom aliĝis pli da helpantaj organizoj, inter aliaj, la Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj la Meksika Esperanto-Federacio (MEF). Aldone, daŭre venis konstanta intereso de averaĝe pli ol 500 aliĝintoj kaj disvolviĝis du versioj por meza nivelo de la kurso. Ankaŭ konsiderinde

estas ke kelkaj el la lernintoj de pasintaj kursoj eĉ fariĝis oficialaj instruantoj aŭ helpinstruantoj en postaj kursoj, kio multe helpis por pli kapable subteni la postulojn kaj evoluon de la kursoj.

En 2024, la kurso ricevis la statuson de oficiala lingvo-kurso ĉe la meksika universitato Benemérita Universidad Autónoma de Puebla

(BUAP)¹ pere de la kunlaboro kun la esplor-projekto Interkultura Komunikado (IKo)² realigata de la sama universitato. Tiu projekto estas konstatinda rezulto de harmonia laborado de la kunorganizantoj Doniben Jimenez, Luis Obando kaj Moisés, kune kun la multaj bonkoraj instruistoj, kaj de la fido kiun UEA, TEJO kaj la aliaj organizoj donis al la teamo de KEL. 



1. buap.mx

</

Joanne Cho

Mi estas Joanne Cho el la Centra Marbordo de NSK en Aŭstralio. Mi diplomiĝis pri edukado, precipe pri lingvoinstruado, ĉe Universitato Teknologia de Sidnejo. Ĉe la Universitato de Sidnejo, mi diplomiĝis pri internaciaj rilatoj kaj politika ekonomio. Origine, mi estis komputila programisto el Seulo, Koreio. Do, kiel vi vidas, mi havas vastajn interesojn kaj mi studis kaj laboris en la supre menciitaj kampoj.

Tamen, mia amo ĉiam restas kun Esperanto, ekde mia dudekjariĝo. Esperanto vere transformis mian vivon en diversaj aspektoj: ĝi donis al mi ŝancojn vojaĝi internacie uzante la lingvon, geedziĝi al bonkora kaj inteligenta Esperantisto, krei karajn geamikojn tra la mondo, pli bone kompreni multajn kulturojn pere de Esperantista amikeco, kaj sperti belegajn magiojn en Esperantujo. Sen Esperanto, mi ne estus la riĉkora homo, kiu mi estas nun.

Mi estis (kaj verŝajne ree estos) altlerneja instruisto en Aŭstralio, sed nuntempe mi pli ĝuas esti instruisto por plenkreskuloj kaj esti organika farmbienisto. Mi havas jardekojn da sperto pri instruado de Esperanto kaj aliaj temoj, havante fortan intereson pri la lernado de ĉiu individua lernanto.

Jen, bonŝance mi instruos meznivelan

klason dum la Kongreso en Aŭklando en 2026. Estas vere ekscite, ke ni renkontiĝos, kunlernos kaj kunloĝos dum ses kongresaj tagoj.

En mia klaso, mi intencas kune esplori diversajn elementojn de nia lingvo. Unu el miaj celoj estas, ke la lernantoj fariĝu pli memfidaj kaj fluaj parolantoj kaj prelegantoj. Por atingi tiun celon, ni studos kaj diskutos interesajn, stimiligajn kaj pensigajn tekstojn de eminentaj verkistoj. Ni ankaŭ gustumos belajn poemojn pri naturo kaj vivo. Se oni volos, ni studos ankaŭ iom pri medicinaj herboj, kiujn mi kultivas en mia farmbieno kaj uzas tre efike kontraŭ diversaj sanproblemoj.

Dum la kurso, ni verkos mallongajn eseojn kaj prezentos ilin. Tiam specifaj gramatikaj elementoj estos pli profunde esplorataj, por ke la studentoj atingu pli kontentan kaj elegantan skribstilon.

Krome, ni ne forgesu amuziĝi per paroligaj, divenigaj kaj problem-solvaj ludoj – foje teame, foje individue. Aktive partoprenante la ludojn kaj la kurson, oni ĝuante lernos!

Se vi volas plibonigi vian konversacian nivelon kaj stilon, sed ankoraŭ ne aliĝis al la Kongreso – nun estas la ĝusta tempo! **E**



El la regionoj

Por detaloj de grupoj kaj kunvenoj en Aŭstralio, vizitu esperanto.org.au/lokaj-grupoj.

KVINSLANDO

Brisbana Esperanto Societo

Ni kunvenas proksimume ĉiun duan semajnon ĉe la hejmo de Doug Eising aŭ en kafejo. Plej bone konfirmi per doug.eising@ozonline.com.au.

Unu aŭ dufoje en la jaro la kunveno okazas en la hejmo de Peter Danzer en Caboolture, kie membroj havas ŝancon trarigardi la E-bibliotekon.

– Petro Danzer

NOVA SUD-KIMRIO

Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrio (Esperanto NSW)

Esperanto-Domo

143 Lawson St, Redfern NSW 2016

Malfermita al la publiko ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00

Instagram: [esperanto_nsw](https://www.instagram.com/esperanto_nsw)

Facebook: [EsperantoNSW](https://www.facebook.com/EsperantoNSW)

Retpoŝto: nsw@esperanto.org.au

Ekzistas ankaŭ grupoj en Manly, la Centra Marbordo kaj Cooma.

Vidu esperanto.org.au/nsk

Esperanto NSW antaŭnelonge prenis oportunon partopreni en servo provizata de entrepreno, Practera, por neprofitcelaj organizaĵoj. Practera liveras programon, partnere kun aŭstraliaj universitatoj, por ebligi aŭstraliajn neprofitcelajn organizaĵojn konekti kun teamoj de studentoj por fari merkatan esploron, kaj taksi tiujn organizaĵojn laŭ socia, media kaj financa perspektivoj. Nia universitata partnero estis University SA.

El pluraj eblaj proponitaj strategioj, ni elektis la “Kreskan Strategion”, ĉar ni volas pliigi la nombrojn da esperantistoj kaj membroj de Esperanto NSW.

La fina raporto estis liverita kaj prezentita je la fino de majo. Inter la sugestoj estis:

- “Vorto de la semajno” – interrete kaj sur signoj ekster Esperanto-Domo
- Krei mallongajn filmetojn ĉe YouTube/TikTok/Instagram
- Partneri kun lokaj kafejoj en Redfern por eventoj “language and coffee” aŭ dumtempaj kulturaj vesperoj.
- Nova, plibonigita emblemo
- Uzu QR-kodon(j)n sur la ekstero de Esperanto-Domo kaj en presita materialo
- Artaj instalaĵoj/murpentraĵoj kundezajnitaj kun lokaj artistoj aŭ artstudentoj (ni povus partneri kun lokaj lernejoj aŭ TAFE)
- Malgrandaj strataj eventoj, kiel “Esperanto taster afternoons” kun senpaga kafo kaj 15-minutaj enkondukaj babiladoj

SUD-AŬSTRALIO

La maja kunveno de la adelajdanoj okazis en la Ŝtata Biblioteko. Dum ĝi Sandor Horvath prezentis interesajn aferojn pri Kanguru-insulo kaj sia plurtaga piedmarŝado.

La 31an de majo ni ekskursis nord-orien ten de Adelajdo al la urbeto Strathalbyn. Margaret Furness loĝas tie kaj gvidis nin al la lokaj galerio, librovendejo kaj muzeo. Estis agrable revidi Margaret kaj ankaŭ la 93-jaran Bob Felby.

Junie ni kunvenis denove per Zoom. La preleganto estis Indrani Beharry-Lall, kiu rakontis al ni pri sia ekskurso al la bela montaro Flinders.

La preleganto de la junia kunveno estis Andrew Woods. Ni aŭdis interesajn aferojn pri suna, akva, sabla kaj aliaj horloĝoj.

– Katja Steele

VIKTORIO

La Enderby Esperanto-Centro (Unit 304, 343 Little Collins Street, Melbourne)

Finfine post multaj jaroj de revoj, serĉado kaj malespero, la Melburna Esperanto-Ascio nun posedas sian propran posedaĵon. Danke al Kep kaj Doroteo Enderby, ni heredis monon kaj, kun la helpo de la Aŭstralia kaj Nov-Sud-Kimria Esperanto-Asocioj, ni havis sufiĉan rimedon por aĉeti oficejon en la centra parto de Melburno. Post la heredo estis pli ol jaro antaŭ ol ni trovis lokon en la centro de Melburno, tre proksime al publika transporto, kun ne tre altaj daŭrigaj kostoj. La oficejo ne estas tre granda, sed sufiĉa por nia biblioteko, arkivoj, kaj kunvenotablo kaj seĝoj.

La 7an de junio ni okazigis Malferman Tagon, kaj poste, feston por la membroj kaj aliaj, kiuj interesiĝis pri la afero. Ni eĉ



havis vizitanton el Adelajdo, Paul Desailly, kiu ĉeestis kun siaj fratinoj. Bongusta festmanĝo, ĉampanjo, muziko kaj ridoj plenumis la vesperon. Multaj el niaj klubanoj kaj ne-esperantistoj festis kun ni. Ni ĝuis la belan kaj esperplenan etoson, precipe ĉar niaj nombroj plialtiĝas pro la ceteraj entuziasmaj junaj membroj. La oficejo estis bele dekoraciita de Joanne kaj Peter Johns.

La biblioteko havas pli ol 2 000 librojn ordigitajn de nia bibliotekisto, Bradley Steele, kun helpo de aliaj, kaj la arkivoj estis ordigitaj de Heather Heldzingen, kiu nun havas spacon en sia aŭtomobilejo por sia aŭto!

Dum jardekoj ni kunvenis ĉe Ross House, sed nur dum du horoj semajne. Nun niaj membroj povas viziti kaj uzi la oficejon iam ajn, ne nur por kunveni, sed por uzi la bibliotekon, kaj por aliaj distraĵoj.

Do refoje, ni devas danki al la Aŭstralia kaj Nov-Sud-Kimria Esperanto-Asocioj por la malavaraj donacoj, kiu helpis nin atingi nian revon.

– Heather Heldzingen

Mi sole stiris aŭteton de Adelajdo al Melburno (700 km) meze de nia vintro, por ĉeesti historian malfermon de nova



centro, kiun melburnaj esperantistoj sen ia ajn financa ŝuldo nun posedas kaj funkciigas, kaj – mirakle laŭ mi – ĝi estis ĉeestata de junuloj.

– Paul Desailly

Daŭras >



(Ambau fotoj) Malferma Tago ĉe la Enderby Esperanto-Centro

NOV-ZELANDO

Aŭklando

Aŭklanda Esperanto-Societo festis Esperanto (Libro)-Tagon sabaton, la 26an julio per lunĉo ĉe la Wintergardens Cafe kaj promenado tra la bonege zorgataj ĝardenoj.

Cameron raportis pri utila agado


dum “Clubs Expo”, du-taga evento ĉe Universitato de Aŭklando, komence de la nova semestro (21an kaj 22an de julio). Multaj interesaj interŝanĝoj okazis ĉe nia budo.

AES (Aŭklanda Esperanta Societo) renkontiĝas ĉiumonate. Por pliaj informoj, bonvolu kontroli nian retejon: www.aes.org.nz

– Bradley McDonald 🇪



De la maldekstro dekstren: Cameron Burton, Bradley McDonald, Georgia Naish, Callum King, Sophie Henderson – Aŭklanda Esperanto-Societo



KONTRIBUU al **ESPERANTO**

sub la suda kruco



Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo Petro Johns

4 Helen Webb

5 Franciska Toubale

7 Taryn Ellis, per Museums Victoria

CC BY

11 per Trevor Steele

12–17 Sophie Henderson

19–21 David Ryan

22 Lyndon Walker per YouTube

23 St Francis Retreat Centre,
Moisés Herrera, Joanne Cho,

Auklando: Sulthan Auliya per Unsplash

24 Moisés Herrera

25 Alan Turvey

27 per Trevor Steele

28 per Petro Johns

29 per Bradley McDonald,
Stefan per Unsplash

32 Jonny M ê la Trilanda Kongreso,
Bandung, Indonezio, 2016.

Foto: Kam Lee

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

William Georgeson, Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**

Committee Members:

Dave Dewar, Stephen Epstein, Georgia Naish,
Lorraine Wong

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
esperantonewzealand@
gmail.com
0800 350 781

“Esperanto?”

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

